

La Merkato

la Laŭokaza Novaĵletero de la

Internacia

Komerca kaj

Ekonomia

Fakgrupo

n-ro 28

Oktobero 1989

IKEF * 1984

Forsendado de La Merkato

La du lastaj numeroj de la IKEF-bulteno estis senditaj pere de privata poŝtservo "DHL". Oni certigis al ni, ke ĝi funkcias minimume same rapide kiel normala poŝto. Tamen, dum la Universala Kongreso mi aŭdis de (germanaj) membroj, ke la julia revuo alvenis nur post kelkaj semajnoj. Povas esti escepto; se ne, ni konsideru la sendsistemon. RR

La ĉifoj LM certe atingis vin tre malfrue; pri tio kulpas mi. Pro urĝaj profesiaj kialoj mi malĝentile decidis, ke la afero atendu; mi petas sincere vian pardonon. /dk

Novaj broŝuroj de IKEF aperis

Dum la Universala Kongreso IKEF prezentis al la publiko du eldonaĵojn:

Identecŝildaro

Ĝi listigas la profesiajn detalojn de 36 IKEF-anoj. Prezo: 100 belgaj frankoj (inkluzive de sendkostoj). Mendu ĉe Roland Rotsaert. La broŝuro jam estas sendita al personoj, kiuj antaŭmendis ĝin.

Proveldono de Komerca Terminaro

Jam de kelkaj jaroj s-ro Wiersch kunordigas la preparojn de esperanta komerca terminaro. Por konigi la ĝisnunajn rezultojn al pli larĝa publiko, IKEF presigis broŝuron (ĉ. 85-paĝa, formato A4) kun ĉ. 1500 terminoj, ordigitaj laŭ la angla lingvo, kun tradukoj al germana, hispana, franca, itala kaj esperanta lingvoj. Prezo: 400 belgaj frankoj (plus sendkostoj: 50 frankoj en Eŭropo, 100 frankoj ekster Eŭropo). Mendu ĉe Roland Rotsaert aŭ Flandra Esperanto-Ligo. Ĝi ankaŭ estas havebla ĉe pluraj libroservoj. RR

Malferme pripensas d-ro Picasso la termino MARKETING. Tiu fako diras multe, ankaŭ al ni, kiel Esperantistoj. Aktuale mi bone povus montri la taŭgecon de nia lingvo en la Mannheim universitato, se mi ricevas internacie mondvastan respondon al mia demando. - Paĝo 3! /dk

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether; S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ce s-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membro-administrado:

Ce s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio

Redaktora sidejo:

Ce s-ro Daniel König, Schwarzwaldstraße 47 D-6800 Mannheim 1, FR Germanio; telefono: +49.(0)621.821710

Enhavo:

Estraro, sidejoj, enhavo	2
Saluton dk	3
Jarĉefkunvena raporto dk	4
Kio estas MARKETING; termina pripensoj de d-ro Picasso	6
Internacia konferenco en Ĉinio dk	7
Radio Havano Kubo; Bonvenon novaliĝintoj; Enkonduko en la komputadon <u>por ne-komputistoj</u>	8
Kotizoj, kontoj kaj perantoj; Transloĝiĝinto	9
LA SEKCIO TERMINARA INFORMAS de s-ro Wiersch	10
Adresetikedoj; Reklamtarifoj	12

S-ro Lawrence Mee (IKEF 2) anoncis en la revuo "Esperanto" n-ro 1005, septembro 1989, paĝo 161, sian ekŝiĝon el dumviva membreco de la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

La estraro de IKEF bedaŭras tiun paŝon de s-ro Mee, tiom pli, ke li estas kune kun s-ro Braun kunfondinto de IKEF ekde 1984. Ni deziras al s-ro Mee sanon, feliĉon kaj sukceson en la estonteco.

Saluton

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, karaj belegantoj,

kiel vi eventuale scias mi estas studento kaj kiel studento mi skribu ekzercdokumentoj pri diversaj fakaj temoj. En la aktuala semestro ni grupe (3 - 6 personoj) pristudas temon, kiu hazarde ege rilatas al internacieco. Cu tio ne donas infueblecon al mi. La temo tekstas:

"Elementoj kaj problemoj de la formado de strategia Marketing-fru-avert-sistemo"

diskutas tiun kampon antaŭ la imago de entreprenaj potencoj kaj malfortoj kun la ekspektataj ŝancoj kaj riskoj en ŝanĝantaj cirkumstancoj. Interesas nin la BAZOJ sur kiuj gvidantoj decidas (kompaniaj estraranoj aŭ en la alta administrado).

Je la problemoj de elekto inter pluraj alternativoj da eksterlandaj aktivecoj la demando estas:

"Kiel akiri la koncernajn informojn

- valide kaj firma
- konfide kaj pli... ?"

Kiuj faktoj surbazas por decidanto reale kaj kiuj teorie ili favore uzu? La teorio intencas funkcii kiel helpilo por trovi la ĝustajn demandojn por akiri la gravajn, signifantajn informojn; la antaŭdirantajn kialojn.

Eble mi sukcesas impresi la grupon, la profesoron kaj sian imponan aŭskultantaron, pere de via reago, pri la profundaj, rapidaj eblecoj de nur arta lingvo. Mi ĝenu nenium. Laŭ mi tiu eta projekto estas malgranda provebleco celante Neesperantistojn.

Se mi ricevas spertojn, ideojn aŭ/kaj opiniojn de via profesio/lando, tiam mi konjektas vian intereson pri nia laboro kaj mi raportos.

Bedaŭrinde nia fordona limdato por la skribota ekzercdokumento jam estas ĝijare. Laŭ via "ludemo" mi ekspektas amaso da poŝto. Do, etajn sciigojn plaĝigos pli ol neniu granda.

Nun mi deziras fruktedonan legadon de nokte kunmetitaj tekstoj (informoj)

via David lig

/dk

RAPORTO PRI LA CIJARA GENERALA KUNVENO

Dum la 74-a Universala Kongreso en Brajtono okazis la ĉi-jara ĝenerala kunveno de IKEF, vendrede, je la kvara de aŭgusto 1989, je la 10.⁰⁰ horo ĝis la 11.³⁰ horo en salono Holmes. Ĉirkaŭ 40 homoj plenumis la ĉambron; 20 inter ili IKEF-anoj. Ĉe la estrara tablo sidis s-ro Franz Josef Braun, prezidanto, s-ro Roland Rotsaert, financa konsilanto, kaj s-ro François-Xavier Gilbert. Post salutvortoj de nia prezidanto li raportis koncize pri la membroevoluo, la peranto-situacio kaj pri tio, ke ni nun estas ligita al UEA kiel *kunlaboranta asocio*. Li laŭde menciis s-ron Kees Ruig (IKEF 68), kiu estis tradukinta pasintjare en Rotterdam la prelegon de s-ro Landmann pri la taskoj de la komerca ĉambro Rotterdam. Pri la terminara aktiveco li rakontis, ke ni sukcesis publikigi la komercan terminaron de la Internacia Komercna Ĉambro (Paris) kun la aldonitaj esperantlingvaj esprimoj. (Gi nun estas mendebla ĉe la perantoj kontraŭ 20 germanaj markoj aŭ egalvaloro.) La laboron kunordigis s-ro Hans Wiersch (IKEF 19), pro kiu li meritas laŭdon. La identecŝildojn de la IKEF-membraro kompilis s-ro François-Xavier Gilbert en speciala kajero: "IDENTECŜILDARO 1989". (Ankaŭ tiu estas akirebla.) La venonta, jam kuranta projekto en tiu kampo estas la traduko de la oficiala ekonomia (multlingva) vortaro de la Eŭropa Komunumo. Tiuj klopodoj gravas, ankaŭ, ĉar la BSO-anoj bezonas la fakaj esperantlingvaj terminoj por DLT, la aŭtomata traduksistemo, kiu uzas ESPERANTON kiel pontlingvo. S-ro F.J. Braun daŭrigis konstatante, ke la "Laŭokaza Novajletero" iĝis "La Merkato"; ĉar la ĝisnuna redaktoro, s-ro Lawrence Mee, ĉesis sian laboron, s-ro Daniel König transprenis la oficon de redaktoro de "La Merkato". Je la fino de lia raporto, li rekomendis al ni varbi komercajn anoncojn por FOKUSO aŭ por la monata revuo

B I L D O ; g r u p o



Laŭ la tagordo sekvis la financa raporto de s-ro Roland Rotsaert, kies detaloj estas troveblaj ĉe la paĝoj 6 kaj 7 en Laŭokaza Novajletero n-ro 25. Li raportis, ke ĉefa kaŭzo por la defcito en 1988 estis la kostoj pro la preparo de "Komercna Terminaro". Tamen ne povas fine resti defcito en la kaso de IKEF pro tiu afero, ĉar s-ro Braun jam antaŭe estis anoncinta, ke li persone transprenos eventualan negativan saldon inter vendosumo kaj kostoj de Komercna Terminaro. S-ro Rotsaert ankaŭ raportis pri ĵus enirinta donaco pri

MONATO. Li malkaŝis kvar avantaĝojn:
- la gazetoj ricevas monon;
- IKEF ricevas el tio makleraĵon;
- traduki komercan anoncon estas interesa tasko kaj reala lingva aplikado;
- surprizitaj gekolegoj en la reklamoficejoj revizias siajn opiniojn pri la utilo kaj taŭgeco de E-o.



20.000 belgaj frankoj, ties donacinto ne volas publikigi sian nomon. Do, s-ro Rotsaert pentras entute pozitivan bildon de la financa situacio de IKEF.

La ĉeestantaj IKEF-membroj unuanime decidis likvidon de la deficitito je 8947 belgaj frankoj el 1988 per eluzo de parto de la kapitalo. Per unu kontraŭvoĉo ili ankaŭ malŝarĝis la estraron.

S-roj Braun kaj Picasso jam en Rotterdam estis elektitaj ĉis 1990. Por la estrara oficperiodo 1989-1991 estis unuanime reelektataj s-ro Rotsaert, Gether, Gilbert kaj Yamasaki, kaj novelektata s-ro Daniel König anstataŭ la demisiinta s-ro Mee.

Por la longdaŭra kaj fervora laboro de s-ro Mee kiel redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero dankis al li en la nomo de IKEF s-ro Braun elkore.

El la vigla diskuto mi nur rimarku la demandantan kontribuon de s-ro Cwik, kiu instigis nin pripensi la strategion de IKEF: "Al kiu (kaj al kio) ni celas?" /dk

K I O E S T A S M A R K E T I N G

Pripensoj rilate al merkataj studoj kaj agadoj kaj al terminologiaj problemoj, kiujn ni IKEF-anoj devus analizi kaj prikiskuti. Tiu ĉi eseo estas ankaŭ oportuneco por ekzameni la aktualaj opinioj pri la moderna merkata analizo.

Cu ni "marketingas", "merkatas" aŭ "surmerkatis"?

Mi ne ŝatas uzi en esperanto la anglan vorton "Marketing". Laŭ la Fundamento mi povus esperantigi ĝin per "marketingo"; tamen la sufikso -ing ne taŭgas en nia lingvo.

Se ni analizas la originon de la angla vorto, ĝia radiko estas market=merkato. La sufikso, kontraŭe, indikas, angle daŭran agadon, simile al nia -ad. La vorto "merkato" indikas tre konkretan koncepton. Merkato estas: vendejplaco, vendarejo, eĉ bazaro. Sed ĝi ankaŭ indikas pli ĝeneralan, idean koncepton. Merkato estas aro da demandoj kaj ofertoj. La moderna ideo de "Marketing" ne signifas pretigi vendarejon aŭ bazaron, sed studi, analizi la ĝeneralan merkaton kaj, sekve, eltrovi la plitaŭgajn solvojn por enmeti sukcese varon sur la merkata sekcio interesata.

Merkato estas ankaŭ la aro de la eblaj klientoj (homoj, familioj, grupoj), al kiuj la merkatanalisto direktas sian atenton.

Do, merkato laŭ almenaŭ tri bazaj signifoj: vendarejo; geografia areo, kie vendeblas la varon; aĉetontaro.

Kiu aŭ kia vorto povas plenumi resumi tiel vastan koncepton? Cu "merkata" taŭgas kaj sufiĝas? Laŭ la senco: "daŭre agadi laŭ aŭ sur la merkato", tio estus eble bona vorto. Alternative ni konsideru "surmerkatis" laŭ la senco, eble pli praktika, pli funkcia, "enmeti ion sur la merkaton". Se la unua rilatas al ĝeneralaj merkataj funkcioj, la dua rilatas pli al vendado. Se pli profunde ni volas analizi la koncepto de "merkato", ni devas individuigi la 3 K, nome la tri seriojn de subjektoj:

Konsumantoj - Konkurencoj - Komercaj perantoj. Ĝis kelkaj jaroj antaŭe, la rilatoj inter firmao kaj merkato limiĝis al la "3K". Tio tro simpligas la merkatanon, ĉar tia rilato ankaŭ devas konsideri tiun kompleksa kaj varia sistemo, kiu estas la "medio" aŭ pli taŭge: la "scenejo". Tio estas ĉio, kio ĉirkaŭas la merkaton, iel kondiĉigante ĝin. Ene de la medio ni trovas plurajn subjektojn, kiuj povas influi ankaŭ grave la merkaton, ekz. la leĝoj kontraŭ poluo, ktp.. Aliaj influaj subjektoj estas la tiel diritaj (angle) "opinion leaders": kiel esperantigi? Opinilideroj? Opiniigantoj? Laŭ tiaj konsideroj, merkato plivastiĝas siajn interesojn kaj agadojn kaj naskiĝis de la "megamarkato". Sinteze, hodiaŭ ni povas difini merkatanon kiel:

(a) Orientigo de la entreprenoj, kiu celas profiti por la kontentigo de la bezonoj de la konsumantoj (de ĉi tie la diferenco inter la merkatanalistas kaj produktorientigitaj entreprenoj, t.e. celantaj al produktado sen taksita tendencoj (ĉu trendoj?) de la merkato, aŭ al la merkato.

(b) Komerca filozofio, pensmaniero, kiu konsideras la entreprenon, ne sendependa, sed aganta en la sistemo merkato/medio. D-ro M. Picasso

Internacia konferenco en Ĉinio

La "3-a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto" okazos de la 25a ĝis la 30a de majo 1990 en Beijing, Ĉinio.

La temo estos: "Scienc-teknika progreso kaj monda ekonomia kunlaboro". Interalie pritrakto:

- Teknika invento kaj internacia kunago;
- Teknika transigo kaj ekonomi-komerca kunlaboro;
- Esperanto servas por la evoluo de scienc-tekniko kaj ekonomio.

Oferataj estas pluraj ekskursoj kaj postkonferencaj vojaĝoj. La Organizanto estas: La Scienc-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio. Prizorgas s-ino Wang Yuchun; ĉe ŝi vi petu detalajn informojn. /dk

Radio Havano Kubo sendas "esperante". La redaktoroj estas s-ino Maritza Gutierrez Gonzalez (KEA) kaj s-ro Orlando Raola Gonzalez (KEA). La kunordiganto de tiu kuba radiostacio estas s-ro Humberto Casanova Gonzalez (RHK). En la 11a de septembro ĉijare estis la unua datreveno de la Esperanto-elsendoj en Radio Havano Kubo.

Radio estas medio por informado kaj informoj estas gravaj por la ekonomio kaj la komerco. Do, interesitoj, ne hezitu montri al la radiostacio, ke vi kunsentas la bezonon de Esperant-lingvaj elsendoj. Petu aktualan horaron kaj frekvenc-informilon ĉe:

Radio Havano Kubo; Esperanto-Redakcio
Poŝtfako 7026, Havano, Kubo

Bonvenon al niaj novaliĝintoj!

S-ro Katsuo Yano, (IKEF 83), Akebono Shokai, 4F Amiko Bldg, 1-24 Motomachi, Tokushima-shi, 770, Japanio

S-ro Hiroŝi Nakada, (IKEF 84), Hinode, 4F Amiko Bldg, 1-24 Motomachi, Tokushima-shi, 770, Japanio

S-ro Ali Khoshmashraban, (IKEF 86), Rasem Co., 1000 Vali-e-Asr Ave., Tehran 14338, Irano

S-ro Marcel Delforge, (IKEF 87), Rue de Glacières 16, B-6001 Marcinelle, Belgio

S-ro András Lukacs, (IKEF 88), "EDUKO" GM, Budaörs, Pf. 50, H-2041 Budapest, Hungario

Keyword Enterprises Ltd., (IKEF 89), S-ro H. Lamily, 1 Harman Close, London NW2, England, Britio

Traduk-Servo Esperanto, (IKEF 90), S-ro Peter W. Miles, Kebbel House, Watford WD1 5BE, England, Britio

S-ro Roland Lindblom, (IKEF 91), Stenbockens gata 102, S-136 62 Hanginge, Svedio

S-ro Jacques Chretien, (IKEF 92), 12, Avenue des Chênes, F-06300 Nice, Francio; telefono: 93.56.01.96; inĝeniero, konsilanto por firmaoj (emerita)

Enkonduko en la komputoradon por ne-komputistoj

Rüdiger Eichholz (Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1B0) preparas libron pri uzo de personaj komputiloj (precipe IBM-kongruaj). Jam eblas antaŭmendi ĝin. Oni pagu la libron post ricevo de la unua sekcio; se la mendonto resendas tiun sekcion, li ŝuldas nenion. RR

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ciuj, kiuj intencas kunlabori/subteni la klopodojn apliki Esperanto en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

Kontoj: Ĉe UEA, kodo ikef-c, aŭ ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

Perantoj:

Francio: S-ro François-Xavier Gilbert, Vert Coteau, Longeville en Barrois, F-55000 Bar le Duc, CP 1275-89 L Nancy)

FR Germanio: S-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István Gether, Varsányi Irén út. 8, H-1027 Budapest

Italio: D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, I-20057 Veduggio al Lambro

Japanio: S-ro Seikō Yamasaki, 185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĉekkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)

Jugoslavio: S-ro Sotir Taleski, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje

Svislando: S-ro André Piérard, Chemin des Voirambeys, CH-3974 Mollens, (Poŝtĉekkonto, n-ro 19-33545-3)

Togolando: S-ro Gbeglo Koffi, P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

Korekto en Identecŝildaro

S-ro Kees Ruig, (IKEF 68)
profesia adreso: Nijmegen (anstataŭ Nimwegen)
telefakso: +31.80.781424
lingvaj eblecoj: nederlanda, esperanta, angla, germana, franca, hispana, sveda (iom)
diversaj: ekseksportestro; delegito de UEA; peranto por im- kaj eksportistoj c̃iulandaj

IKEF-ano transloĝiĝis:

S-ro John C. Rapley, (IKEF 6), 39 Alexander Road, Bexleyheath, Kent DA7 4TU, Britio



COVALEX S.A.

CHEMIN DES VOIRAMBEYS

CH - 3974 MOLLENS

(Svislando)

... JAM DE LONGE KONAS
LA FABRIKANTOJN DE LA ALTKVALITAJ PRODUKTOJ
KIUJ NUR EN SVISLANDO EKZISTAS
KAJ KIUJN VI NE ANKORAŬ TROVIS

...AŬ ELEKTRONIKAJ EROJ

...AŬ VINOJ

...AŬ ŜIPOJ

...AŬ BANKAJ SERVOJ EN CH KAJ L

(KOMUNAJ ŜPARLOKUMOJ EN DIVERSAJ LANDOJ)

PROFESIE - FIDINDE - DISKRETE

ELDONAS KOMPUTERPROGRAMOJN (IBM AŬ KONGRUAJN)

ŜANĜAS, ADAPTAS ELEKTRONIKAJN INFORMOJN EL UNU
AL ALIAN SISTEMON (DISKOJ - DISKETOJ 8"→5"→3")

TELEFONO ++-41-27 / 41 62 45

TELEFAKSO ++-41-27 / 41 90 65 ("FAX")

Lastminutaj anoncoj (89.11.10)

Pliaj aliĝoj: (detaloj en venonta numero)

93. Peter Berx (B) - baldaŭ finos studojn de tradukisto

94. Brendan Marron (Belfast, Britio)

95. GALENIKA - Dr. Sci. Mika J. Andric

Alvenis kotizpago de Henry Ordenez Potes, sen mencio
de adreso. Persono konata de iu ?-----
UFSIA (parto de Universiteit Antwerpen) organizos
seminaron (en angla lingvo) pri:

Business Communication in Multilingual Europe

Dato: 22-24 februaro 1990 Kotizo: 5.000 belgaj frankoj

Informoj: Chris Bracke, UFSIA, Prinsstr. 13,

B-2000 Antwerpen - telekso 33599 - fakso 3-220.44.20

LA SEKCIO TERMINARA INFORMAS:

Komerca Terminaro post la aperigo

Intertempe pasis kelkaj monatoj post la aperigo de la prov-eldono "Komerca Terminaro" okaze de la 74-a Universala Kongreso en Brajtono. Kiel vi scias la kunlaborantoj de la Sekcio Terminara de la IKEF verkis aldonon de Esperanto al la kvin lingvoj de la baza fakvortaro "Key Words in international Trade" revizie eldonita 1985 de la Internacia Komercia Ĉambro en Parizo. La eldona kvanto estis lingita, tamen restas ankoraŭ certa nombro aĉetinda.

Dum nia laboro antaŭ la eldono ni konstatis ke multe da es-primoj alilingvaj devas esti korektitaj. Pro tio nia prezidanto Franz Josef Braun petis en la antaŭparolo ke vi sciigas modifotaĵojn al la kunordiganto Hans Wiersch, Tilsita Strato 39, D-7063 Welzheim.

Post la revizio ni volus proponi al IKĈ plibonigi la koncernajn terminojn antaŭ nova eldono de "Key Words ...".

Ĝis nun la kunordiganto ankoraŭ ne ricevis proponajn informojn. Eble la gelegantoj ne havis tempon, ĉar tia laboro bezonas ĝin, eble oni plejmulte akceptis tiun eldonon precipe rilate la esprimojn anglajn-Esperantajn.

Sed ni volus peti vin hodiaŭ, se vi havas eĉ nur kelkajn proponojn, bonvolu informi la kunordiganton. Tio helpus al ni por finfari kaj reaperigi ekzaktan seslingvan eldonon de la terminaro enhavanta pli ol 1.750 esprimojn.

En la Esperantaj tekstoj de la Komerca Terminaro ni ne metis la hoketon super "u", ĉar ni ne posedas tiun kompletan literon. Ni do faris tion pro tio ke Zamenhof donis, jam en la "Unua Libro", kaj oficiale en la "Fundamento", la permeson forlasi tiun supersignon. Malgrau la neĉeesto de la hoketo la Esperantistoj certe scias korekte prononci la vortojn. Fakte la hoketo super "u" nur estas helpo por lernantoj, pli malfrue ĝi estas ĝena.

Finfine ni havas grandan peton: Demandu la libroservojn de via lando, ĉu ĝi jam ofertas la Komercan Terminaron. Se ne, bonvolu apogi la reklamon. Ĉiu ekzemplero vendita estas en-spezo enda por la IKEF-a kaso. Dankon!

/hw

Kiuj informoj troviĝas sur la adresetikedoj de la membroj?

Super la nomo troviĝas aro da ciferoj, kies signifoj eble ne estas tute klara por la legantoj.

Ekzemple: 111(89<uea)
(1) (2) (3)

La unua cifero "111" estas la membronumero. La dua cifero "89" signifas, ke la membrokotizo por la jaro 1989 estas pagita. Se vi ekzemple antaŭpagis vian kotizon ĝis la jaro 1991, tie troviĝos "91". Tiel vi povas ekscii ĉu via kotizpago efektive alvenis. Tamen eblas, ke via pago ne tuj aperas sur la etikedo: ekzemple la konteltiroj de la Universala Esperanto Asocio nur estas dumonataj; foje la etikedoj estas preparitaj kelkajn semajnojn antaŭ forsendo de la bulteno. La tria indiko estas helpo por la kasisto: tiel li povas eltrovi, kiel alvenis la lasta kotizpago (UEA, poŝtĉekkonto, peranto, ...).

RR

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj planas novan vortaron; la nomo estu: "Interetna Vortaro de Ordinara Esperanto". "La celo de la projekto estas kompili kaj eldoni unu-lingvan vortaron de ses mil aŭ iom da ĉiutagaj vortoj bezonataj de Esperantistoj en ĉiuj mondpartoj". Tion sciigon sendis s-ro Mee. Li kunlaboras en tiu projekto kaj serĉas subtenantojn ĉiaforme.

Kontribuantoj, kiuj posedas IBM-kongruan komputilon, ege helpus al mi ŝpari tempon, se ili favore kunsendus siajn informojn sur disketo. (Se nur ies sekretari(in)o uzas ĝi ektroviĝis ŝanco iomete instrui la lingvon.) Volonte mi provus legi aliajn formatojn.

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo en tute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

La rajtoj de represo estas malferma, antaŭkondiĉe, ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzemleroj estas petataj.

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

Varbi anoncojn estas ege favora rimedo subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: *finance kaj reputacie.* /dk
